Martin Rinckart,

# Nun danku ni al Dio

*tradukita de Clarence Bicknell*

Nun danku ni al Dio
Per mano, voĉo, koro!
La tuta mondo ĝojas
Pro lia granda gloro.
De frua infaneco
Li nin beninta estas,
Kaj liaj amdonacoj
Kun ni ankoraŭ restas.

Li gvidu nin konstante
Sur tuta vivovojo,
Benante niajn korojn
Per paco kaj per ĝojo;
Li ŝirmu de danĝero,
Li donu korfavoron,
Kaj de malbono gardu
Nin nun kaj ĉiun horon.

Ho, estu niaj voĉoj
Kun danko nun levataj
Al Patro, Fil', Spirito,
Egale adorataj.
De homoj sur la tero,
Ĉielaj anĝelaroj,
Al Dio sonu laŭdo
Dum la eternaj jaroj.

*Traduko de la Germana poemo "Nun danket alle Gott" de* Martin Rinckart *(∗1586-04-24 – †1649-12-08) en Esperanton de Clarence Bicknell.*

*Arg-1044-2120 (2014-06-08 10:55:18)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Clarence_Bicknell`*.*

Martin Rinckart,

# Nun danket alle Gott

Nun danket alle Gott
mit Herzen, Mund und Händen,
der große Dinge tut
an uns und allen Enden,
der uns von Mutterleib
und Kindesbeinen an
unzählig viel zugut
und noch jetzund getan.

Der ewigreiche Gott
woll uns bei unserm Leben
ein immer fröhlich Herz
und edlen Frieden geben
und uns in seiner Gnad
erhalten fort und fort
und uns aus aller Not
erlösen hier und dort.

Lob, Ehr und Preis sei Gott,
dem Vater und dem Sohne
und dem, der beiden gleich
im höchsten Himmelsthrone,
dem dreimal einen Gott,
wie es ursprünglich war
und ist und bleiben wird
jetzund und immerdar.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Martin Rinckart *(∗1586-04-24 – †1649-12-08), publikigita 1636.*

*Arg-1044-2119 (2014-06-08 10:57:54)*

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas interalie en* `http://www.lieder-archiv.de/nun_danket_alle_gott-notenblatt_300778.html`*. Tie estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. Pri la tradukinto vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Rinckart`*.*